

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 25, Januaro 2020



*Al la tuta mondo:*

**Bonvenon al la verda Gotenburgo!**

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo .....	2	Saniga danco – linio-danco .....	19
Pri Ora Ĵurnalo .....	2	Arbarfiloskopo – Grönsångare .....	21
Espe-Porko meditas .....	3	Jan Hellström raportas pri "birdvizito" en Sundsvall .....	21
Novjaro en 1896 (el la revuo "Lingvo Internacia") .....	4	Singin' in the rain .....	23
La nova jaro .....	4	Humuro el malnova gazeto .....	23
Ĉe la nova jaro .....	5	Preventado de malsanoj .....	24
Esperanto-sabato 18 januaro kun Lena Thunberg, kiu informis pri la situacio en Okcidenta Saharo .....	5	Hunda vivo. Homa vivo. ....	24
La revuo Västsahara .....	8	Feliĉe vi dormas dum 25 jaroj .....	25
Esperantista nepo .....	9	Sano per skribado.....	26
Ĉu la prezidento Trump pensas pri ESPERANTO – la lingvo de paco!!!???	10	Lenke Szász, verkistino el Rumanio.....	31
Poemo de Rudyard Kipling .....	10	Domoj sen loĝantoj .....	32
Författardrömmar – verkistorevoj .....	11	Frosto .....	33
Patrino Svea en Gotenburgo .....	12	Romano realisma kaj psikologia .....	34
La sano de Tella, nia tergloba patrino .....	12	Jarmila Rýznarová – artikolo el la ĉeĥa revuo Informilo.....	35
Johan Rockström atentigas nin pri la minacoj al nia nuna vivstilo .....	13	Arabaj proverboj .....	35
La malamiko de la sano: la blanka pulvoro .	14	La evoluo de la vapormaŝino.....	36
Intervjuo kun Elisabeth Wickelgren, Gråbo, pri akvogimnastiko .....	15	El la Turka Stelo: Esperantistaj kunvenoj en Turkio .....	37
Interesa adreso en Gotenburgo: "Saltholmen" .....	18	La aviadilo – rakonto de Neĝati Ĝumali.....	37
Vintergäst vid Torslandaviken på Hisingen .	18	Ebbe Vilborg en memoro.....	41
		Einar Dahls esperantominnen (sista delen).	43
		Amuza hobio .....	46

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





## Espe-Porko meditas



☆ **Nova jaro. Novaj defioj! Novaj revoj! Ek!!!**


- ☆ Kiel aspektis la nova jaro laŭ la revuo "Lingvo Internacia de 1896"? Kolekto de monataj revuoj dum du jaroj troviĝas en Stannum.
- ☆ La plejparto de ĉi tiu numero temas pri sano – sano de Patrino Tero, de Patrino Svea kaj de ni ĉiuj.
- ☆ Korpa ekzercado per akvogimnastiko, naĝado, liniodanco kaj promenoj, kun aŭ sen hundo, rekomendas!
- ☆ Cerba ekzercado per skribado, verko de poemoj, fotado, legado de libroj kaj revuoj estas bonaj okupoj.
- ☆ Ĉu estas sanige legi kaj skribi krimromanojn? Verŝajne jes, ĉar la foto de Julian Modest el Hungario, kreiva verkisto de krimromanoj, montras ridetan vizaĝon. Mi pensis ke Svedio estas "la lando por krimromanoj", sed Hungario estas grava konkuranto.
- ☆ La foto de Johan Råckström montras seriozeman personon... sed se la mondaj landoj energie laboras por savi nian planedon – li ĝojos.
- ☆ Ĉu lakto, blanka faruno kaj sukero estas danĝeraj nutraĵoj... Hmmm, mi ne scias... sed porkoviandon mi tute ne rekomendas!!!!
- ☆ Rido estas bona por la sano... Ĉu vi scias, ke prezidento Trump nomis sian

sekretarion de la defendo "Mark Esperanto" anstataŭ "Mark Esper"? Okazas ke li foje faras agrablajn eldirojn!

- ☆ Strebo helpi handikapulojn (Jarmila) kaj tutan popolon en Saharo (Lena) donas bonan senton.
- ☆ Inveni maŝinojn – (la vapormaŝino evoluas) aŭ flugi per aviadilo (turka rakonto) – estas bone por la memfido! Por mi estas miraklo kiam mia komputilo ofte funkcias kune kun projekciilo.
- ☆ De kio venas ke Jan iras de Gotenburgo al Sundsvall por rigardi birdojn? Certe troviĝas birdoj pli proksime!
- ☆ De kio venas ke Ingegerd volas kanti "Singing in the rain" kiam pluvas? Ja, preskaŭ ĉiam pluvas en Gotenburgo. Mi volus sendi la pluvnubojn al Saharo!
- ☆ Kaj laste – estas iomete pli ol unu jaro post ke Ebbe Vilborg forpasis. Li estas neforgesebla viro. Liaj amikoj skribas pri li.
- ☆ La venontan Esperanto-Sabato (1an de februaro) Gert Gelotte prelegos pri gazeta ĵurnalistiko.
- ☆ Kaj last-laste tuj planu por partopreni la somerajn esperantokursojn en Gotenburgo!  
Bv noti: 22–26 junio!

Ĝis februaro! /Siv

# Novjaro en 1896 (el la revuo "Lingvo Internacia")



*En la biblioteko de Stannum troviĝas kolekto de "Lingvo Internacia" de januaro 1896 ĝis decembro 1897. La Klubo Esperantista en Upsalo eldonis ĝin. Kosto de abono: kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = frankoj 4,25 = rubloj 1,50.*

## La nova jaro

Ni deziras al niaj legantoj feliĉon kaj ĝojon en la nova jaro 1896. Niaj legantoj kune kun ni ekdeziru, ke tiu ĉi jaro estu feliĉa ankaŭ por nia kara lingvo kaj alportu sukceson al nia afero.

En la komenco de l'jaro pasinta nia lingvo ŝajne sin trovis en tre bona stato: "la fulmotondro de reformoj por unu fojo purigis la atmosferon kaj donacis al ni pacon kaj lumon por longa tempo... kaj por nia afero komenciĝis nun nova tempo de jam senhalta kaj senmalhelpa progresado".

Tamen, kiel niaj legantoj mem scias, nian aferon trafis baldaŭ grava malfeliĉo, kiu venis tute malatendita, neantaŭvidita, kaj la jaro,

komencita kun la plej bonaj esperoj, transformiĝis en jaron, tre malfavoran por Esperanto. Multaj el niaj amikoj perdis la kuraĝon, multaj mallevis la manojn, ne sciante ĉu oni povas daŭrigi la bataladon. Sed ĉia malbono, ĉia malfeliĉo enhavas ĉiam ion bonan kaj utilan: la ekbato, kiu faligas kaj mortigas malfortulon nur pravas la forton kaj la vivpovon de tiu, kiu ne falas. Esperanto elsuferis la malfeliĉon. La elbato ne mortigis nian lingvon, kaj nun ni vidas, ke ĝi ree progresas, denove vastiĝas, fortiĝas kaj riĉiĝas.

Ĉu tio ĉi ne pravas, ke nia ideo ne estas utopio, ke lingvo internacia ne estas fantomo kaj ke ni servas al afero efektive utila kaj efektivegebla? Ni sekve ne timu, ke nia afero pereos, se la eksteraj cirkonstancoj iafaje prokrastas ĝian progresadon. Tial ni povas komenci la novan jaron kun novaj esperoj, kun novaj fortoj kaj kun nova energio. Ni iru kuraĝe antaŭen, sciante ke nia laboro ne pereos vane kaj ke ĉio, kion ni faras por la bono de Esperanto, estas paŝo al solvo de la

problemo, kiu okupas la mondon en daŭro de jam tri centjaroj.

La nuna stato de nia lingvo povas nun jesigi ĉion diritan. La aliĝo de "L'Etranger" kaj la bonaj sciigoj, kiuj regule venas el Francujo, la sukcesoj de nia lingvo en Portugalujo, la

novaj eldonoj, riĉigontaj nian literaturon – ĉio pruvas, ke niaj amikoj ne ĉesas laboradi kaj ke Esperanto senhalte vastiĝas.

Plenan sukceson al ĉies laboro, rapidan progreson al nia afero!



## Ĉe la nova jaro

Finiĝis jam por ni malnova jaro  
Eterne pasis ĝiaj tagoj for.  
Tre bona estis ĝi por la homaro,  
Kaj ni ĝin danku el la tuta kor'!

Sonoras adiaŭaj sonoriloj  
Solene super land' kaj super mar',  
Kaj ekesperas de l'homar' la filoj,  
Ĉar venos baldaŭ la estonta jar'.

Malfermas iu pardon. Jen infano  
Aperas bela en la ĉambr' al ni,  
Portante libron en malgranda mano,  
La bona nova jaro estas ĝi

Sed kio estas de la libr' enhavo?  
Feliĉo aŭ malbono? Diru ĝin!  
Benita paco aŭ kruela glavo?  
Ĉu venos ĝojo aŭ malĝojo nin?

Ne scias ni kaŝitan estontecon,  
Ĉar restas ĉio en la man' de Di',  
Sed kien ajn sendados Li, bonecon  
Li donos, kaj kontentaj estu ni.

Otto Zeidlitz



## Esperanto-sabato 18 januaro kun Lena Thunberg, kiu informis pri la situacio en Okcidenta Saharo



*"Min första kontakt med människor från Västsahara hade jag 1985. Av en slump fick jag kontakt med Emmaus, Björkå, som skickade begagnade kläder till flyktingläger i Algeriet där det fanns – och fortfarande finns – flyktingar från Västsahara, efter Marockos ockupation av landet*

*Tre dagar tillbringade jag där och efter den upplevelsen har jag fortsatt att arbeta för Västsahara. För att väcka opinion började jag hjälpa till med tidskriften Västsahara.*

*"Mia unua kontakto kun homoj de Västsahara (Okcidenta Saharo) mi faris en 1985. Hazarde mi ekhavis kontakton kun Emmaus Björkå, kiu sendis utiligitajn vestojn al azilejoj por rifuĝintoj en Alĝerio, kie troviĝis – kaj ankoraŭ troviĝas – rifuĝintoj de Okcidenta Saharo, post la okupiĝo de la lando fare de Maroko.*

*Tri tagojn mi pasigis tie kaj post tiu travivo, mi plulaboris por Okcidentasaharo. Por vekti opinion, mi komencis kunhelpi pri la revuo*

***Senare blev jag dess redaktör. Jag åker numera också runt till gymnasieskolor och föreläser om folkets utsatta situation.”***

Nu är det alltså Göteborgs esperantoförening som får möjlighet att lyssna. Liksom gymnasisterna säger vi: Vi visste inte, att Europa fortfarande har en koloni i Afrika.

Formellt är Västsahara en spansk koloni. Under 60-talet blev kolonierna självständiga. Också Spanien fick i uppdrag av FN att avveckla sin koloni.

1975 ockuperade då Marocko 80 % av Västsahara och flyktingar tog sig till den icke-ockuperade östra delen eller till Algeriet.

En illegal och hemlig överenskommelse mellan Spanien och Marocko, gav Spanien rätt att fortsätta sitt inkomstbringande fiske vid Västsaharas kust i ersättning för att Spanien lämnade området och Marocko fick ta över.

Marocko har anlagt en minerad gräns mellan de båda delarna av Västsahara. Idag sitter hundratals västsaaharier i fängelse, efter demonstrationer för ett självständigt enat Västsahara. Att visa upp sin egen flagga räcker för att bli arresterad. Befrielseörelsen Polisario Front uppstod redan under den spanska kolonialtiden.

En FN-styrka finns på plats sedan 1991 för att genomföra avkoloniseringen av Spanska Sahara (Västsahara). Både Marocko och Polisario godkände att västsaaharierna i en folkomröstning skulle bestämma om man ville tillhöra Marocko eller vara självständiga. Ännu har ingen folkomröstning ägt rum. Marocko vägrar.

Folkrättsligt fördöms Marockos ockupation, men de länder som erkänt Västsahara är afrikanska, asiatiska eller sydamerikanska. EU har inte erkänt landet. I FNs säkerhetsråd har Frankrike vetorätt och är angeläget om

***’Västsahara’. Pli poste mi fariĝis ties redaktoro. Mi nuntempe ankaŭ rondiras al gimnazioj kaj prelegas pri la peniga situacio de la popolo.”***

Nun ja estas la Esperanto-Societo de Gotenburgo, kiu havas la eblecon aŭskulti. Same kiel la gimnazianoj ni diris: Ni ne sciis ke Eŭropo daŭre havas kolonion en Afriko.

Formale Okcidentasaharo estas hispana kolonio. Dum la sesdekaj jaroj la kolonioj fariĝis memstaraj. Ankaŭ Hispanio ricevis de U.N. la komision finreguligi sian kolonion.

Nu, en 1975 Maroko okupis 80 % de Okcidenta Saharo kaj rifuĝintoj iris al la neokupita orienta parto aŭ al Alĝerio.

Neleĝa kaj sekreta konsento inter Hispanio kaj Maroko donis al Hispanio la rajton daŭrigi sian profitigan fiŝkaptadon laŭlonge la marbordo de Okcidentasaharo, kiel kompenso por ke Hispanio forlasis la areon kaj Maroko povis ĝin transpreni.

Maroko faris minitan limon, inter la du partoj de Okcidentasaharo. Hodiaŭ centoj da okcidentasaharanoj estas en malliberejoj post manifestacioj por memstara unuigita Okcidentasaharo. Montri sian flagon sufiĉis por esti arestita. La liberiga movado Polisario Front ekis jam dum la hispana kolonia epoko.

Militaj fortoj de U.N. estas surloke ekde 1991 por realigi la malkoloniadon de Hispana Saharo (Okcidentasaharo). Kaj Maroko kaj Polisario akceptis ke la okcidentasaharanoj en referendumo aprobu ĉu oni volas aparteni al Maroko aŭ esti memstara. Ankoraŭ neniu referendumo okazis. Maroko rifuzas.

Internacia juro kondamnas la okupon fare de Maroko, sed tiuj landoj, kiuj agnoskis Okcidentasaharon estas landoj en Afriko, Azio kaj Sudameriko. EU ne agnoskis la landon. En la Konsilio de Sekureco, Francio ja havas vetorajton kaj deziregas bonajn rilatojn, ekonomie, milite kaj politike kun Maroko.

goda förbindelser, ekonomiskt, militärt och politiskt med Marocko.

I den ockuperade delen finns viktiga naturresurser som fosfat, olja, uran och koppar. Spanien värnar om sin "rätt till fiske" och EU uppskattar att Marocko hindrar afrikaner att nå Europa.

Västsahara har inga starka vänner. Om Sverige kunde erkänna landets självständighet skulle det i alla fall vara en markering.

Internationella domstolen i Haag har fastställt att Marocko inte har rätt till Västsahara.

Lena berättade om verkliga hjältar hon träffat i Västsahara.

På följande sida handlar det om Västsahariska Aminatou Haidar, vinnare av det s.k. Alternativa Nobelpriset 2019. Denna text satte Lena in på Tidskriften Västsaharas Facebook.

[www.facebook.com/tidskriftenvastsahara](http://www.facebook.com/tidskriftenvastsahara)

Vill du läsa om nomadliv i Västsahara? Då ska du läsa Monica Zaks bok: Pojken som levde med strutsar, som vi skrev om i nummer 24 av Ora Ŵurnalo.

Du kan läsa mer om Västsahara på tidskriftens hemsida: [www.vastsahara.net](http://www.vastsahara.net).

**Ingegerd fotograferade. /Siv**

En la okupita parto troviĝas gravaj naturaj riĉaĵoj kiel fosfato, uranio, oleo kaj kupro. Hispanio defendas sian "fiŝrajton" kaj EU alte taksas ke Maroko malhelpas al afrikanoj atingi Eŭropon.

Okcidentsaharo ne havas fortajn amikojn.

Se Svedio agnoskus Okcidentsaharon estus almenaŭ indikado.

La internacia tribunalo en Haag konfirmis, ke Maroko ne havas rajton al Okcidentsaharo.

Lena rakontis pri veraj herooj kiujn ŝi renkontis en la Okcidenta Saharo.

Sur la sekva paĝo temas pri la Okcident-saharanino Aminatou Haidar, gajninto de la "Alternativa Nobelpremio" en 2019. Tiun tekston Lena enmetis en Facebook de la revuo Västsahara/Okcidenta Saharo.

[www.facebook.com/tidskriftenvastsahara](http://www.facebook.com/tidskriftenvastsahara)

Ĉu vi volus legi pri nomada vivo en Okcidentsaharo? Se jes, legu la libron de Monica Zak: "La knabo, kiu vivis kun strutoj", pri kiu ni skribis en numero 24 de Ora Ŵurnalo.

Vi povas legi pli (svedlingve) en la retpaĝo de la revuo Okcidentsaharo:

[www.vastsahara.net](http://www.vastsahara.net).

**Ingegerd faris la bildojn. /Siv**



*Entute 18 personoj aŭskultis la prelegon de Lena kaj miris ke ili sciis malmulte pri la situacio en Okcidenta Saharo.*



*Lena montras al la sola restanta kolonio de Eŭropo.*

Datoj en la historio de Okcidenta Saharo

- 1885 Hispana kolonio
- 1966 UN-decido pri ĉeso de koloniado
- 1973 La Polisara fronto estas formita.
- 1975 Maroko okupas Okcidentan Saharon
- 1975 Rifuĝinta azilejo en Alĝerio
- 1975–1991 Milito Maroko–Polisario
- 1991 La pacoplano de UN sed la okupado daŭras
- 2008 EU ligas rilaton kun Maroko
- 2010 Gdeim Izik



*Se oni montras la okcidentsaharan flagon, oni riskas esti arestita de la marokaj policistoj, kiuj troviĝas ĉie en Okcidenta Saharo.*



**La revuo Västsahara**

<https://www.facebook.com/tidskriftenvastsahara/>

En Facebook mi trovis la suban artikolon pri Aminatou Haidar. /Siv





**La 2an de januaro** volontulaj organizoj en Okcidenta Saharo intencis celebri la homrajtaktiviston Aminatou Haidar pro ŝia "Alternativa Nobelpremio" The Right Livelihood Award", kiun ŝi ricevis en Stokholmo, en decembro 2019.

La celebrego okazus en la lokalo de la asocio ASVDH en la okupita ĉefurbo El Aaiún.

Tamen maroka polico haltigis la celebregon kaj devigis la partoprenantojn forlasi la lokalon.

Poste marokaj policistoj ĉirkaŭadis la hejmon de Aminatou Haidar kaj malhelpis al homoj viziti ŝin.

The Right Livelihood Foundation kondamnas la agadon de la maroka polico kaj ĝenerale la restriktajn kontraŭ la rajto de penslibereco, societlibereco kaj kunvenlibereco de la okcidentaj saharanoj.

Aminatou Haidar, kiu estis persekutita dum jaroj, estis elmetita al misfamigo en sociaj medioj tuj post ke ŝi estis donita la Right Livelihood premio.

RIGHTLIVELIHOODAWARD.ORG DIRAS:

La maroka polico malebligas aktivistojn de Okcidenta Saharo celebri 1919 laŭreaton Aminatou Haidar.

**Den 2 januaro** skulle västsahariska frivilligorganisationer fira människorättsaktivisten Aminatou Haidar för hennes "Alternativa nobelpris", The Right Livelihood Award, som hon mottog i Stockholm i december 2019.

Firandet skulle äga rum i föreningen ASVDH:s lokal i Västsaharas ockuperade huvudstad El Aaiún.

Marockansk polis stoppade dock firandet och tvingade ut deltagarna från lokalen.

Därefter omringade marockansk polis Aminatou Haidars hem och hindrade människor från att besöka henne.

The Right Livelihood Foundation fördömer den marockanska polisens agerande och överhuvudtaget restriktionerna mot västsahariernas rätt till åsiktsfrihet, föreningsfrihet och mötesfrihet.

Aminatou Haidar, som förföljts i årtal, utsattes för en smutskampanj i social media omedelbart efter att hon tilldelats Right Livelihoodpriset.

RIGHTLIVELIHOODAWARD.ORG SÄGER:

Marockansk polis förhindrar Sahrawi-aktivister från att fira pristagaren Aminatou Haidar 2019.

## Esperantista nepo



Okazas ke venas "esperantistaj genepoj" al la gotenburga klubo. "Mia avo estis fervora esperantisto. Li donis al mi librojn."

Jan Samuelsson donacis hereditan esperantan biblion kaj kelkajn pinglojn al la gotenburga klubo. Lia avo nomiĝas Ragnar Samuelsson.

La teksto de la plej granda pinglo havas la tekston "Gdanzig 1927"... Estas ja la urbo de niaj polaj geamikoj, Gdansk, kiu en 1927 havis UK:n. /Siv *Ingegerd fotis.*



# Ĉu la prezidento Trump pensas pri ESPERANTO – la lingvo de paco!!!???



Eble ne. Li nur erare nomis sian sekretarion de la defendo Mark Esperanto anstataŭ Mark Esper.

(El *The New York Times*: "Mark Esperanto? Trump Misnames His Defense Secretary in Tweet").

**Alia amuza historio pri Mark Esper**  
(de Inga):

Kim Jung Un en Norda Koreio – kiel ĉiuj azianoj – havas problemon kun R kaj L. Tial Mark Esper estos Mal Esper en Norda Koreio. /Siv

<https://www.nytimes.com/2019/10/20/us/politics/mark-esperanto-trump-tweet.html>

## Poemo de Rudyard Kipling



<b>Naskiĝo</b>	30-an de decembro 1865 en Mumbajo
<b>Morto</b>	18-an de januaro 1936 (70-jara) en Londono
<b>Edz(in)o</b>	Caroline Starr Balestier
<b>Idoj</b>	John Kipling • Elsie Bambridge • Josephine Kipling
<b>Profesio</b>	verkisto • poeto • romanisto • milita ĵurnalisto • verkisto de porinfana literaturo • aŭtobiografo • scenaristo • ĵurnalisto • sciencfikcia verkisto • aŭtoro

Inga trovis la jenan poemon de Kipling:

Se povas vi pensadi kiam ĉiuj  
ekfreneziĝas kvazaŭ kulpa vi;  
se vin mem fidi, ĉie malfidate,  
sed kun toler' pri ĉies opini';  
se povas vi senlace atendadi,  
primensogate ne mensogas mem,  
aŭ malamate, restas vi amanta,  
sen tro da bonaspekt' aŭ saĝdirem';

se revii povas vi – ne tamen sklave;  
se pensi – kaj pensaĵojn meti for;  
se povas Malsukceson kaj Triumfon –  
trompulojn – same trakti via kor';  
se lasas vi friponoj aŭ simpluloj  
la veron tordi kiun diris vi  
vivcelojn povas vidi vi rompitaĵ,  
kaj per uzitaj iloj fari pli:

se povas vi en unu hazardludo  
de vi jam akiritan riski ĉion,  
kaj perdi, kaj denove ekkomenci,  
kaj pri la perdo ne eldiri ion;

se povas vi muskolon, nervon, koron,  
jam eluzitajn, igi servi vin,  
kaj tiel daŭrigadi la laboron  
havante nur la Volon fari ĝin:  
se povas vi babili ĉie – virta,  
kun reĝoj promenadi – ne fiere,

se povas vundi nek malam' nek amo,  
se ĉiu al vi gravas sed modere;  
se povas en minuto mallasema  
sesdeksekundan vojon kuri vi,  
via la Tero estas, kun enhavo,  
kaj plu – vi estas Viro, fil' de mi!

*Rudyard Kipling*

Nobelpremiito pri Literaturo en 1907, fama  
precipe pro libroj por infanoj, aparte "The Jungle  
Book" (La libro de la ĝangalo).

## Författardrömmar – verkistorevoj

### – jen du poemoj de Monica el Gotenburgo



### Författardrömmar

Tar sikte mot stjärnorna  
Det är dit jag vill komma  
Att skriva något är en lång kamp  
En lång kamp, en lång väg  
Att skriva är mödosamt  
Det är min dröm  
Jag tar sikte mot stjärnorna

### Bokens tillkomst

Ord blir till meningar  
Meningar blir till kapitel  
Kapitel blir till en bok  
Att bli utgiven av en dröm

### Verkistorevoj

Ekceli al steloj  
Estas tien mi volas veni  
Verki ion estas longa batalo  
Longa batalo, estas longa vojo  
Verki estas peniga  
Estas mia revo  
Mi ekcelas al steloj

### Estiĝo aŭ kreiĝo de la libro

Vortoj iĝos frazoj  
Frazoj iĝos ĉapitroj  
Ĉapitroj iĝos libro  
Por esti eldonota de revo

# Patrino Svea en Gotenburgo



**La domo "Sveahuset"** situas en la dombloko "54 Alströmer" ĉe "Västra Hamngatan 3". La domo estas konstruita en florenca stilo, en la jaro 1887 kaj estis preta 1889. La domo havas tri apartamentojn kaj ankaŭ subtegmentan etaĝon.

La unua statuo kiu staras sur tegmento en Gotenburgo estas "Hör oss Moder Svea" (Aŭdu nin Patrino Svea). Svea havas leonon

sidante ĉe ŝi. La statuo estis konstruita en Berlino.

Diversaj agadoj daŭriĝis en la domo dum fluanta tempo ekz. bankoj, asekuraj kompanioj, agadoj de Gotenburgo Universitato ktp.

Sed, la granda demando estas: Kion vidas "patrino Svea" el sia alta ejo super la homoj en Gotenburgo? / *Ingegerd*

## La sano de Tella, nia tergloba patrino

Tella – ni povus nomi nian terpatrinon Tella, ĉar Tellus estas ja vira nomo.

Tella estas ĉagrenita.

Ŝi pensas:

– Neniam antaŭe iu en la bestoregno donis al mi tiom da problemoj, kiel la homoj, la etaj teruloj! Ili kondukas kiel musoj, blekantaj kiel leonoj. Ili pensas ke ili regas min – la tutan terglobon!



La plej junaj etuloj verŝajne estas pli saĝaj ol la plenkreskuloj. Nur observu la solan 16-jaran (nun 17-jaran) knabinon, kiu vekis la mondon... ne, ankoraŭ ne tiuj, kiuj flugas tien reen, sidas en kunvenoj, subskribas deklariojn, kiuj ĉiam favoras ilin mem – ne min.

Ne, temas pri la nova generacio, kiu volas ŝpari min de troekspluatado. Se ili daŭrigas kiel nun, eble mi daŭrigos esti Tella, kiu donas manĝojn, nestojn kaj loĝejojn al ĉiuj etuloj. Sed se la plenkreskaj etuloj ne

Kiam mi malfacile toleras la homojn, mi skuas min tiel ke iliaj domoj disfalas kaj la elektraj retoj rompiĝas. Mi sendas tertremojn kaj brulegojn kaj tiam ili estas tre malgrandaj la homaj etuloj.

Sed katastrofoj fakte igas la homojn helpi unu la alian. Tiam venas homoj, kiuj antaŭe povus esti malamiko por helpi la suferantajn ulojn. Tiam ili venas kun ambulancoj, estingkamionoj, fosiloj, fosmaŝinoj kaj hundoj. Tiam troviĝas homoj, kiuj savas aliajn homojn riskante siajn proprajn vivojn. Tiam mi amas la etulojn kaj trankviliĝas.

Mia interno ĉiam estis brulvarmega, sed kun la jaroj mia surfaco malvarmetis al sufiĉe agrabla temperaturo por kreskaĵoj, homoj kaj bestoj. Sed la malsaĝaj homoj fosis en miaj karbonprovizoj, forhakis miajn arbarojn, drenis miajn marĉojn kaj venenis miajn kampojn kaj riverojn.

aŭskultas la junajn etulojn – kio tiam okazos? Ne, pri tio mi ne volas pensi.

Se la homoj pensus pli longe ol pri sia propra generacio, ili estus pli zorgemaj pri siaj kunuloj kaj pri mi. Ili ankaŭ respektus la rajtojn de bestoj.

Se la homoj bone kondutas, mi ne plu dronigos ilin per inundoj aŭ bruligos ilin al karbono. Tiam ni havu konfidon unu al la aliaj, la etuloj kaj mi. /Siv

*Bildo de Pixabay.*



*El Wikimedia Commons.*

## Johan Rockström atentigas nin pri la minacoj al nia nuna vivstilo

**Johan Fredrik Rockström**, naskita en 1965 estas sveda agronomo kaj natursciencisto ĉe la universitato de Stokholmo.

En 2007 li fariĝis membro de Kungliga Skogs- och lantbruksakademien kaj 2013 membro de Kungliga Vetenskapsakademien.

Impact Research (PIK) en Germanio. PIK estas unu el la plej elstaraj centroj en Eŭropo por esplorado pri klimato kaj fortikeco.

Do – Johan Rockström estas persono, kiu vere scias pri kio li prelegas. Por la sveda publiko li ankaŭ estas konata kiel "sommar- och vinterpratere" – radioprogramo kun famaj personoj parolantaj pri siaj koraferoj.

La mondaj landoj promesis je la Pariza negoco limigi la tergloban varmigon sub 1,5 gradoj.

Sed, laŭ Rockström ŝajnas ke ni ne sukcesos. – Ni vidas pli kaj pli sciencajn pruvojn ke ekstremaj veteraferoj okazas je pli malalta temperaturo, ol ni antaŭe kredis.

Antaŭ kelkaj jaroj ni kredis ke dagrada plia temperaturaltiĝo estu traktebla. Nun ni scias ke estos danĝere. Tiuokaze la naturo povus fariĝi memvarmiga kaj estos ekstremaj veteraferoj kiel sekeco, tropikaj ŝtormoj kaj inundoj. La koralrifoj pereos. La permafrosto degelos, metano supreniros de la margrundo, la pluvarbaro en Amazonas mortos kaj ni

perdos la marglacion en Arkto. Tio nur estas kelkaj ekzemploj.

La regantoj en la mondo nepre agu NUN. La ellaso de karbona dioksido devas esti malaltigita per 45 % de la nivelo en 2010 ĝis la nivelo en 2030.

Dum "demanda programo" Johan Rockström menciis kvar paŝojn al pli sekura klimato:

1. Globa jure deviga kontrakto, en kiu ĉiu lando decidu devigan celon por la tempopunkto kiam ĝi atingos socion kun senfosilia ekonomio.
2. Meti koston al karbono, unue en la regiono, poste en la tuta mondo.
3. Establi novan ekonomian mezuron de natura kapitalo, forlasi la BNP-mezuron kaj havi ekonomian mezuron de bonstato.
4. Sciado!

## La malamiko de la sano: la blanka pulvoro

Ne temas pri kokaino, sed pri ordinara nutraĵo, kiun vi aĉetas en ordinaraĵnutraĵvendejoj.

Minaco al la sano – ĉi tiun fojon laŭ "Damernas värld" (La mondo de la sinjorinoj) estas:

### la sukero, la blanka faruno kaj la lakto.

Ralf Sundberg estas kuracisto kaj docento kaj engaĝita en la nutraĵdebato. Laŭ li troviĝas parte logika klarigo: Ekz. postulado de tritiko kreskis dum la pasintaj 20 jaroj. Ni ja estas pliaj kaj ni produktas pli da tritikbazitaj nutraĵoj. Por havi pli grandajn rikoltojn de tiu, oni miksis aliajn tipojn de herboj, kiuj pli rapide kreskas. Tiel la tritiko ŝanĝis kaj niaj stomakoj ne estas adoptitaj al la nova tritiko.

La netoleremo de laktoso eble havas socian kaŭzon. Ni estas pliaj enmigrintoj nun kaj multaj de ili ne toleras la laktoson.

Dum la 60aj kaj la 70aj jardekoj estis debato pri la kaŭzoj de la okcidentlandaj malsanoj: diabeto, graseco kaj kancero. Kelkaj



sciencistoj kulpis la grason, aliaj kulpis la kreskantan konsumon de sukero kaj la ŝanĝon de dikmuelita al maldikmuelita greno.


Nun la komerco profitas el la timo kaj deklaras ke iliaj produktoj ne enhavas sukerojn aŭ farunon. La vendo de alternativaj produktoj kiel faruno de migdalo kaj kokoso kreskas.

Pri alia blanka nutraĵo – la salo – la artikolo diras nenion. /Siv

## Intervjuo kun Elisabeth Wickelgren, Gråbo, pri akvo-gimnastiko



*Antaŭe ŝi estis lignofabriko. Nun ŝi estas sportcentro kun baseno.*



### 1. Du leder sju grupper i vattengympa i Gråbo, nära Göteborg. Hur är grupperna sammansatta?

De som gympar på dagtid är ju naturligtvis daglediga, flest personer som uppnått pensionsåldern.

I kvällsgrupperna är de flesta yngre och några pensionärer. De är inte sammansatta efter något annat än önskemål från deltagarna.

Vattengympa kan alla utöva med vissa begränsningar man själv sätter. Inga rörelser som smärtar och vissa rörelser med begränsat motstånd av vattnet.

### 2. Hur kom det sig att du började och hur länge har du hållit på?

Jag drev simskola för barn från 1986, då Parasollen invigdes och tyckte då att vattengympa kunde vara trevligt som komplement till verksamheten. Från början en kväll i veckan.

Några år senare blev jag tillfrågad av ett annat vg-gäng om jag kunde ta över då deras ledare skulle flytta.

### 1. Vi gvidas sep grupojn pri akvo-gimnastiko en Gråbo, proksime al Gotenburgo. Kiel la grupoj estas formitaj?

Tiuj, kiuj havas gimnastikon dum la tago kompreneble estas liberaj tage, la plejmulto atingis la aĝon de pensiigo.

En la vesperaj grupoj, la plej multaj estas pli junaj kaj kelkaj estas pensiuloj. Ili ne estas kunmetitaj laŭ iu alia principo ol deziroj de la partoprenantoj.

Akvogimnastikon ĉiuj povas praktiki kun kelkaj limoj, kiujn oni mem faras. Neniuj movoj kiuj doloras kaj kelkaj movoj kun limigita rezisto de la akvo.

### 2. Kio estas ke vi komencis kaj kiom longe vi estas faranta tion?

Mi gvidis naĝokursojn por infanoj ek de 1986, kiam la "Parasolo" estis inaŭgurita, kaj tiam mi pensis ke akvogimnastiko povus esti amuze kiel komplemento al la agado.

Komence unu vesperon semajne.

Kelkajn jarojn pli malfrue mi estis demandita de alia akvo-gimnastika teamo, ĉu mi povus transpreni la taskon, ĉar ilia gvidanto trans-

Så det blev tre grupper i veckan till dess de stängde badet i Parasollen.

### **3. Vilka åldersgrupper tror du har mest nytta av vattengympa?**

Alla åldersgrupper men mest äldre och personer som behöver rehabiliteras.

Det är en skonsam form av träning.

### **4. Vilken gruppstorlek är lagom för 10-metersbassängen?**

10–12 personer.

### **5. Vilka olika moment består träningen av?**

Det är Rörlighet, Kondition och Styrka!

### **6. Finns det personer som inte tål klore i vattnet?**

Ja, det är det säkert men det beror lite hur känslig man är om man kan vara med eller inte.

### **7. Många längtar tillbaka till den tiden då du hade vattengympa i Parasollen i stället för som nu i en f.d. industrilokal. Varför?**

Enklare att ta sig till och från bassängen. Lättare att komma i bassängen, bassängen vi nyttjar nu är bäst lämpad som undervisningsbassäng. De flesta som hade vg i Parasollen har lättare att ta sig till den lokalen. Där fanns bastu och fler duschar.

### **8. Finns det tillräckligt många bassänger i Lerums kommun, eller skulle det behövas fler?**

Det skulle behövas fler. Nu talas det om att Vattenpalatset ska stänga och då finns bara denna bassäng i Lerums kommun. I läroplanen står det att eleverna ska kunna simma iaf i år 5? Tror jag. Kan eleven inte simma då ska skolan se till att de får chans att lära sig.

Ska lärare och elever åka till närliggande kommuner för att Lerums elever ska lära sig simma. Vad kommer inte det att kosta.

### **9. Vad vill du säga till politikerna i Lerum – och förresten i hela landet?**

lokiĝos. Tiel fariĝis tri grupoj semajne ĝis oni fermis la banejon de la Parasolo.

### **3. Kiaj aĝgrupoj vi opinias havi la plej grandan profiton de akvogimnastiko?**

Ĉiuj aĝgrupoj, sed ĉefe la maljunuloj kaj personoj kiuj bezonas readaptadon. Estas milda formo de ekzercado.

### **4. Kiu grandeco de grupo estas lagoma por la dekmetra baseno?**

10–12 personoj.

### **5. Pri kiuj momentoj la ekzercado temas?**

Movebleco, Kondiĉo kaj Forto!

### **6. Ĉu troviĝas personoj, kiuj ne toleras la kloron en la akvo?**

Jes, certe, sed dependas iomete kiom sentema oni estas, se oni povas partopreni aŭ ne.

### **7. Multaj sopiras reen al la tempo kiam vi gvidis akvogimnastikon en la Parasolo anstataŭ kiel nun en eksa industriejo. Kial?**

Pli facile iri al kaj de la banejo. Pli facile eniri la basenon. La baseno, kiun ni nun uzas plej taŭgas kiel instru-baseno. La plejmulto, kiu havis akvan gimnastikon en la Parasolo, pli facile iras al tiu loko. Tie troviĝis saŭno kaj pluraj duŝoj.

### **8. Ĉu ekzistas sufiĉe multaj basenoj en la komunumo Lerum, aŭ ĉu oni bezonus pliajn?**

Devus esti pliaj. Nun oni aŭdas paroli pri fermo de Vattenpalatset, kaj tiuokaze troviĝos nur ĉi tiu baseno en la komunumo de Lerum. En la studplano por lernejoj estas skribite, ke la gelernantoj povu naĝi almenaŭ de la 5a klaso, mi pensas. Se la gelernantoj ne povas naĝi tiam, la lernejo aranĝu ke ili havu la ŝancon lerni naĝi. Ĉu instruistoj kaj gelernantoj iru al proksimaj komunumoj por ke la gelernantoj de Lerum lernu naĝi? Kiom ĝi kostus?

### **9. Kion vi volus diri al la politikistoj en Lerum... kaj krome en la tuta lando?**



Se till att iaf öppna bassängen i Parasollen!  
De båda bassängerna i Gråbo kan komplettera varandra.

Stängningen av Parasollenbadet har utestängt de personer med funktionsnedsättningar som inte kan ta sig till varken Vattenpalatset eller Gråbo sportcenters bassäng.

Det är personer som är rullstolsburna och som badat med assistenter ända sedan 1986 och som nu är utestängda från det som gör att de kan behålla rörlighet och klara sig utan assistans vid några tillfällen.

De har ingen stark röst som talar för dem.

Vattengympa i samma grupp år efter år är en social ventil, för många kanske den enda sociala samvaron på en hel vecka!

En kommentar från en person då vi fick besked att badet skulle stängas: nu kan jag lika gärna lägga mig ner och dö! De, flest kvinnor, som är med i vg är personer som arbetat i kommunens tjänst i hela sitt yrkesverksamma liv.

Städat toaletter, kontor, skolsalar, förskolor, skrivbord, arbetat i skolmatsalar, tömt papperskorgar mm innan våra tjänstemän och politiker kommit till sina arbeten.

De syns inte. Att låta badet vara en utgiftspost för sektor lärande är till vissa delar ok men det borde delas med vård och omsorg. Det är våra surt ihoparbetade skattepengar som det slösas med.

Minnesmärke över en olycka för ca 30 år sedan gör Alexander Abenius exalterad och får bifall i kommunstyrelsen.

Tänk på konsekvenserna av en stängning av Parasollenbadet med största sannolikhet kostar från en annan ficka men likväl skattepengar. Hyran måste kommunen betala till och med 2021 är inte det att slänga bort resurser. Kampen för badet är inte över och vi kräver **ALLA MÄNNISKORS LIKA VÄRDE!**

Prizorgu almenaŭ ke la baseno en la Parasolo estu remalfermita! La du basenoj en Gråbo povus kompletigi unu la alian.

La fermo de la Parasol-banejo baris por la personoj kun malbona funkcio, kiuj povas iri nek al Vattenpalatset nek al la baseno de Sportcentro en Gråbo.

Temas pri personoj kiuj havas rulseĝojn kaj kiuj banis kun helpo de asistantoj ek de 1986 kaj kiuj nun estas forbaritaj de tio, kio igas ke ili povas reteni movkapablon kaj povas helpi al si sen asistantoj – je kelkaj okazoj. Ili ne havas fortan voĉon, kiuj pledas por ili. Akvogimnastiko en la sama grupo, jaron post jaro estas socia ventolilo, por kelkaj eble la sola socia kunveno dum tuta semajno.

Komento de persono, – kiam ni ricevis la informon, ke la banejo estos fermita: nun mi egale bone povas morti! Ili, plej-parto virinoj kiuj partoprenas en akva gimnastiko, estas personoj, kiuj laboris en la servado de la komunumo en tutaj siaj profesiaj vivoj. Purigis necesejojn, oficejojn, lerneĉambrojn, preparajn lernejojn, skribotablojn, laboris en lernejaj manĝoĉambroj, malplenigis paperkorbojn k.t.p. antaŭ ol niaj oficistoj kaj politikistoj alvenis al siaj laboroj.

Ili ne estas videblaj. Lasi la banejon esti elspezita sumo por la sektoro "erudicio" parte okejas, sed la elspezo devus esti dividita de flegado kaj zorgado. Estas niaj pene kunlaboritaj impostoj, pri kiuj oni malŝparas.

Propono pri memoriga monumento de akcidento, kiu okazis antaŭ ĉirkaŭ 30 jaroj, igas la prezidanton de la komunuma estraro ekzaltita kaj la elspezo estas aprobata en la komunuma estraro. Pripensu ke la konsekvencoj de fermo de la Parasolbanejo plej verŝajne prenas monon de alia poŝo, sed tamen impostmono. La luon la komunumo devas pagi ĝis 2022. Ĉu ne estas forĵeti rimedojn? La batalo por la banejo ne estas for kaj ni postulas **LA EGALRAJTON DE ĈIUJ HOMOJ!**

# Interesa adreso en Gotenburgo: "Saltholmen"



En la varma banejo de Saltholmen, kiu konstruiĝis en la jaro 1908 regis totala demokratio. Ĉiuj specoj de homoj troviĝis, junaj kaj oldaj, altaj kaj malaltaj. Ĉiuj estas ne vestitaj, do nudaj. Ĉiuj estas amikoj sen konsideri kiuj oni estas. Sen vestoj oni ne scias la diferencon de klasoj.

Ankaŭ hodiaŭ vi povas viziti la oldan, varman banejon, kiu situas ĉe la maro, sur Saltholmsgatan 44.

Tiu, kiu ŝvitbanas, seka- aŭ malseka, estos espereble plej sana. En la historia epoko multaj el la banantoj post la ŝvitbano dormetis sur benko en persona kajuto. Oni ankaŭ trinkis kafon kaj manĝis buterpanon. Estas bone por hodiaŭaj homoj fari la saman kaj ne stresiĝi.

/Ingegerd


## Vintergäst vid Torslandaviken på Hisingen

Sedan den 15/11 2019 har man kunnat njuta av en svarthakad buskskvätta (nigragorgûlo), som normalt sett borde ha flyttat.

Den milda vintern gör att den kan hitta föda.

Bifogar en bild på den.

/Jan Hellström



# Saniga danco – linio-danco

## Intervjuo kun Barbro Feltzing, Lerum

### Frågor till Barbro Feltzing, Lerum



#### 1. Hur kom det sig att du började dansa linedance?

Jag har dansat sedan jag var 4 år. Jag dansade klassisk balett i 20 år, sedan kom jazzbalett, som jag också undervisade i. Därefter spansk dans och work out. Linedans kom jag in på, bl.a. för att kroppen inte längre klarade de mer krävande danserna i balett och jazzdans.

Jag började i Lerum, när en vän tog med mig och berättade att man kunde åka på linedansevent på olika ställen.

En linedans är koreograferad för samma musikstycke över hela världen med fasta steg och möjliggör att linedansträffarna kan hållas överallt.

#### 2. Hur länge har du lett kurser i linedance i Lerums kommun?

Mellan 6 år–8år. Minns inte hur länge. Tror att du Siv var med från början och kanske vet hur länge?

#### 3. Vad är det bästa med linedance ur hälsosynpunkt?

Linedans är ett mycket bra tränings sätt. Den tränar hela kroppen och hjälper till att hålla uppe balansen. Men främst är det mycket bra för minnet vilket nyligen publicerad forskning har visat.

#### 4. Hur hittar du nya danser?

Genom att jag går in på nätet och tittar på listor över mest dansade danser och följer en del koreografer. Går även kurser på sommaren och får inspiration. Jag väljer mycket en dans på grund av bra musik och roliga och annorlunda steg.

#### 1. Kiel estas ke vi komencis danci linio-dancon?

Mi dancis ek de mi estis 4-jara. Mi dancis klasikan baletton dum 20 jaroj, poste venis ĵazbaletto, pri kio mi ankaŭ instruis. Poste hispana danco kaj "work-out". Al liniodanco mi alvenis, i.a. ĉar la korpo ne plu eltenis la pli postulemajn dancojn en baletto kaj ĵazdanco.

Mi komencis en Lerum, kiam amiko venigis min, rakontante ke oni povus iri al liniodancoeventoj en diversaj lokoj.

Linio-danco havas koreografion por la sama muzikaĵo tra la tuta mondo kun fiksjaj paŝoj. Tio ebligas ke oni povas fari liniodanckunvenojn ĉie.

#### 2. Kiom longe vi gvidis kursojn pri liniodanco en Lerum?

Inter 6 kaj 8 jaroj. Mi ne memoras kiom longe. Mi pensas ke Siv partoprenis de la komenco kaj eble scias kiom longe.

#### 3. Kio estas le plej bona pri liniodanco de sanaspekto?

Liniodanco estas tre bona trejnmetodo. Ĝi trejnas la tutan korpon kaj helpas reteni la balancon. Sed ĉefe estas tre bone por la memoro, kion montris lastatempe publikigita esploro.

#### 4. Kiel vi trovas novajn dancojn?

Mi eniras la interreton kaj rigardas listojn pri la plej dancataj dancoj kaj mi sekvas kelkajn koreografojn. Ankaŭ mi partoprenas kursojn somere kaj ricevas inspiron. Mi tre ofte elektas dancon pro bona muziko kaj amuzaj kaj alispecaj paŝoj.

## 5. Yngsta och äldsta kursdeltagaren?

Gissar att åldrarna är mellan 45–82 år. Tyngdpunkten åt pensionärer.

## 6. Vad har förändrats under de år du lett linedance i synen på dansarten?

